

# Novaĵoj Tamtamas

横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)



## PLANO PRI LA “REKVIEMO”

Je la 2a horo kaj 46 minutoj, en la 11a de marto, 2011, atakis la landon la Granda Tertremo de Orienta Japanio, kaj perdis vivon de multaj homoj. Lastajare, japanlingva rekviema kanto memore al la forpasintoj estis kreita, kaj ties esperantlingva traduko ankaŭ aperis, nome “REKVIEMO — al la viktimoj de la Granda Tertremo en la Orienta Japanio”. Nun estas planata kunkanti la kanton tra la mondo en la 11a de marto. En Jokohamo, s-ro MAKINO entreprenas, ke en la havena parko, la korusa grupo, kune kun esperantistoj, kantu la kanton japane kaj esperante, en la 9a de marto.

Pri tiu kanto estas jenaj interretaj paĝoj:

<http://www1.odn.ne.jp/snisikaw/doc/tinkon.html> (esperantlingve)

<http://www10.plala.or.jp/yasnoli/eec/requiem2.html> (japanlingve)

Sekvas la muziknoto en la dorsa paĝo, kun la plena permeso kaj instigo ĝin disvastigi en Esperantujon.



## TIEL OKAZIS

### LA JARKUNVENO DE NIA RONDO

\*jan., 27, en “Tikyuu-simin Kanagawa-Plaza”, proksime al la Stacidomo Hongoodai

La jarkunveno de Jokohama Esperanto-Rondo estas la plej supera decid-organo de nia rondo, okazanta unu fojon jare, por revui la raporton de la jaro 2012, kaj fiksi la planon kaj buĝeton de la jaro 2013. Ĝin partoprenis 16 membroj, kaj kun 18 mandatoj, la kvorumo (nome duone de 55 membroj) estis plenumita.

Jene okazis la unua parto, de 13-a horo ĝis la 15-a horo.

1. Anstataŭ la Saluto de la Prezidanto, s-ro DOI Hirokaz, kiu pro malsano ne povis veni, estis

saluto de s-ino MIYAZAKI Hideko, la direktoro.

2. Raporto pri la 2012-a agado kaj kaso estis aprobita.

3. La prezidanto kaj la direktoro ĉi-jare deĵoros kiel lastajare. Al la komitatanoj aldoniĝis s-ro SIBAYAMA Zyun'iti.

4. Proponado pri la 2013-a agado kaj buĝeto, estis aprobita kun kelka modifo.

Post paŭzo estis la 2-a parto, kiu fakte fariĝis kanto-ekzercado, ĝis 16h20. Okazis kanto-gvido fare de s-ro MAKINO Mituo, kiu intencas, ke la rondo kunkantos “Rekviemon”, pri kio legu en nia plano supre.

■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti

■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458

■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>

■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

## NIAJ PLANOJ

### AGADOJ

En la 9-a de marto, ĉe la kutima kunveneja konstruaĵo, okazos la foiro de la civitanaj agadoj, de la rondoj uzantaj la centron, inkluzive de ni. Ni ekspozicios pri Esperanto.

### HAMA-RONDAJ VESPEROJ

En la 16-a de marto, kaj en la 20-a de aprilo, ni okazigos Hama-Rondan Vesperon. En marto, s-ino Doi Ĉieko parolos pri Esperanto-movado en Afriko.

### REGULAJ KLASOJ

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

\*Regulaj Klasoj en sabato: Klaso por legado de "Tra dezerto kaj praarbaro", Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / Jokohama Salono / Daŭriga kurso

\*Regula Klaso en merkredo por legado de "Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj".

---

## BELETRO

---



### Monologo de la hundido Gon

HIROSE Kanae

(1)

Mi kaj Franjo dormis en kartona skatolo forlasita antaŭ la urba azilo. Tion mi ne memoris, sed tiel rakontis al ni viro en blanka kitelo. Li daŭrigis, ke li prenis nin en la ĉambron kaj tuj preparis lakton, kiun ni senhalte fortrinkis.

Ni konas nek panjon nek paĉjon. Dum monato ni loĝis tie sub la zorgo de la blank-kitela viro. Nia ĉambro estis obskura, ĉirkaŭita de griza muro kun fermita fenestro. Ni estis malgajaj. Duondormanta Franjo ofte apogis sin al mi. Ŝia varmo kaj la korbatoj kunfandiĝis kun la miaj, kaj tio kondukis min al agrabla dormo kiel en patrino sino.

Iun tagon tra la muro mi aŭdis bruon. Tuj sekvis jelpado historia, kaj jen, maljuna hundo trenite de la kitela viro preterpasis trans la fenestro de nia ĉambro. La hundo vane rezistis antaŭenpaŝi per la rigidiĝintaj piedoj, lia vosto pendis inter la malantaŭaj gamboj. Ankaŭ mia vosteto malleviĝis. Franjo ektemis, kaj mia nazo flaris strangan odoraĉon. Kio okazis? Mi atendis. Post kelkaj minutoj revenis nur la viro kun trista mieno kaj subite kaviĝintaj okuloj. La trenita hundo ne plu aperis antaŭ ni.

Poste mi eksciis, ke la azilo estas akceptejo ne nur de perdiĝintaj hundoj, sed ankaŭ de forlasitaj de sia mastro; kaj ke la hundoj, kies

mastroj ne aperas por repreni sian hundon en la difinita tempo, estas mortigitaj. Nur hundidojn malpli ol tri-monatajn, se ili estas sanaj, oni traktas alimaniere. Mi kaj Franjo apartenis al ĉi tiu grupo. Ni ja havis fortunon.

La azilo staras proksime de marbordo. Ĉiutage la maro frapadis per la ondoj la betonon digon, plejofte samritme, fojfoje petole kaprice, ankaŭ sovaĝe kun terura muĝado. Tiu muĝado elvokis en mi senesperan ululadon de la maljunaj hundoj forkondukitaj. Dum mi loĝis tie, mi ŝtelrigardis tra la fenestro eltrenitan hundon kelkfoje.

En iu sabato matene, oni aranĝis nian ludejon en la korto de la azilo. Kvankam la ludejo estis ĉirkaŭigita per palisaro, tamen ĝi estis sufiĉe vasta por ni tri: mi, Franjo kaj la alia hundido laŭ la aspekto pli aĝa ol ni. Kiel agrable ludi ekstere! "Hej, Franjo! Sekvu min!", mi kuris tien kaj ĉi tien, galopis, ruliĝis, renversiĝis kaj fine kuŝis surdorse. Blankaj nubetoj floris sur la ĉielo, aprila venteto karesis mian frunton. Subite Franjo venis apuden, metis sian piedon sur mian ventron kaj eksuĉis la pinteton de mia ..., "Ho ne! Ne la mammo, sed la mia!", kriis mi tute konfuzite. Kompatinde, ankoraŭ nun Franjo sopiris la patrinon.

Dum ni ludis, kelkaj homoj observis niajn movojn. Unu sinjorino el ili prenis Franjon sur

siajn brakojn, kaj pagis monon ion dirante al nia zorganto. Tuj poste la sinjorino enmetis Franjon en korbon kaj hasteme forveturis de la azilo. Franjo kunveturis. Tiel mia kara fratino foriris. Eĉ momentan rigardon Franjo ne ĵetis al mi ĉe la adiaŭo.

(2)

Intertempe la hundido, ŝajne pliaĝa ol mi, forlasis la azilon prenite de maljunaj gesinoroj. Mi restis sola en la ludejo ĉirkaŭbarita. Ankaŭ la observantoj foriris unu post la alia, kaj nun staris tie nur du sinjorinoj.

“... ja tre vigla..., tiu ĉi hundido bone kreskos”, la flustro haltigis mian snufadon. “Sed ĝi estas tro sovaĝa por via filineto, ĉu ne?” “Tamen oni diras, ke ju pli vigla hundido, des pli facile kreskas”, miaj oreloj streĉiĝis, “kaj ankaŭ, ke oni elektu hundidon, kies nazo estas malseka kaj la okuloj estas brilaj. Mi vidas ĝin plenumi ĉion”. Mi eksidis fronte al la sinjorinoj. Se ili okulis al mi, mi tuj svingis la vosteton laŭeble elegante. “Bone. Laŭ via bontrovo! Vere ĝi estas ĉarma bubeto!”. Mi pensis, ke ili konsiliĝis pri mi kaj ion decidis.

Post unu horo mi estis en aŭto. Sur la seĝo jam estis aranĝita por mi granda korbo kaj en ĝi kuseneto, sur kiu mi iom laca apogiĝis. La aŭto iris jen preter mara digo, jen tra larĝa ŝoseo. Baldaŭ ĉio ŝanĝiĝis. Ni triope, mi kaj la du sinjorinoj, aŭte eniris en loĝkvartalon. Tra la fenestro enfluis refreŝiga venteto; fore hundoj bojadis; infanaj voĉoj preterpaŝis. Mi sentis min agrabla, kvazaŭ Franjo kuŝus apud mi. Ĉiu sono fariĝis febla. Mi endormiĝis.

Kiam mi vekigis, enrigardis mian korbon ses okuloj. Ĉirkaŭis min s-ino Mastrino, ŝia filineto kaj s-ino Najbarino. Antaŭ mi staris domo. Super

la teraso pendis kaĝo, en ĝi pepis birdetoj. Ekde tiu ĉi tago mi loĝis en angulo de la korto, tie jam atendis min ruĝ-tegmenta hundejo. Mi aliĝis al la familio el tri anoj, la geedzoj kaj la filineto.

Milda sunlumo. Mia mastrino fojfoje diris al mi, ke mi estas ja feliĉulo, ĉar ĉiutage mi kuŝas senlabore dormetante. Jes, mi estis feliĉa, sed ŝi taksis min nur laŭ la aspekto. Mi diru, ke mi diligente plenumas mian devon gardi la familion per la ultrakapabloj: mi havas aŭdosenson dekoble pli kompetentan kaj flarsenson milionoble pli kompetentan ol tiuj de la homo. Eĉ dum mi dormas, miaj sensaĵoj estas plene streĉitaj. Vi povas trovi miajn orelojn tre ofte delikate moviĝantaj al atentindaj direktoj. Se nenio okazas, mi meditas pri diversaj aferoj: pri mia historio, pri nia estonteco inkluzive homojn kaj la terglobon, pri promenadoj kaj manĝaĵoj ktp. Vere ne mankas al mi ĉiutagaj temoj.

Mia membriĝo al la familio tre interesis najbarojn. Jen oftaj demandoj kaj la respondoj de mia mastrino: “Ĉu la hundido estas ina aŭ vira?”, “Eksvirsekse, sed ĉe la azilo ĝi estis operaciita, kompatinde”. “Ĉu ĝi estas pursangulo?”, “Ne, ĝi estas bastardo, nura hundaĉo, sed ĉarma kaj saĝa, ĉu ne?”, “Ĉu ĝi meritas gardhundon?”, “Je...s, sed ĝi estas tre bonkora, plejofte iun ajn bonvenigas”. Mi rimarkis, ke mia mastrino ĉiuforte respondas kun “sed”.

Iam, al la unue menciita demando ŝi respondis aldone: “Hodiaŭ en herbejo ĝi pisis ne kaŭre, sed levinte la postan piedon. Tio signifas, ke ĝi ankoraŭ tenas virecon, ĉu ne? Mia amiko instruis al mi tion. Mi ne scias, ĉu vere aŭ ne, sed tamen ...” En la tago, post la promenado ŝi estis ial bonhumora. (daŭrigota)

### LETERO de LEGANTO

Karegaj japanaj geamikoj,

kun granda intereso kaj admiro mi legas vian unuan bultenon de la nova jaro. Mi eĉ elŝutis kaj printis ĝin, ĉar ankaŭ al la membroj de nia E-asocio “Giorgio Canuto” de Parma certe ĝi plaĉos.

Elkoran dankon kaj ankoraŭ multe da bondeziroj por la Nova Jaro. Ĝi estu por ĉiuj vi riĉa je sano, prospero kaj feliĉo.

Amike salutas vin

Luigia, Vittorio kaj Alessandra Madella, Parma, Italujo

# Rekviemo

al la viktimoj de la Granda Tertremo en la Orienta Japanio

\*poez. **TIBA Takao**

muz. **OOTASIRO Masao**

trad. **KONISI Gaku**

aldona aranĝ. **MAKINO Micuo**

**Andanteto** (♩ = ca.80)



1. Ho nun sku - i - ĝas mon-toj kaj jen bru - e - gas ma-ro.  
 2. Ho nun ŝve-ba-das nu - boj en blu' de la ĉi - e - lo.  
 3. Ek nun al la pro-jek - to por ni tre gran-di - o - za!



Ho, pa-ren - car', ho, in-fa - nar' kaj ka - ra a - mi - kar'!  
 Ho, pa-ren - car', ho, in-fa - nar' kaj ka - ra a - mi - kar'!  
 Ho, pa-ren - car', ho, in-fa - nar' kaj ka - ra a - mi - kar'!



A - brup - te sen sa - lut' for - i - ris vi jam nun dis - de ni.  
 Jen Ksi - ti - gar - bo gra - ca kun ri - det' al vi be - nas nun.  
 Per vi - a pro - pra viv' ins - ti - gis vi: ek al ni - a cel'!



Ob-se das nin la me - mor' kaj el-trem-pas nin mal - ĝoj'.  
 De-fi - e in-ten-cas ni re-kons-tru - on de l' hejm - lok'.  
 La dek-u - nu-an de mart' nin a - ta - kis ter - tre - meg'.



La ma - nojn — kun-pre-mu ni kun kvi - et' en la kor',  
 Do bud - hoj — sub-te-nu nin, por ke be - la flo - rar',  
 Ĝin plu trans - ra-kon-tos ni, ĵu-ras ni en la kor'.



por ke res-ta-du en trank-vil' la a - ni - mojen Pa-ra-diz'.  
 por ĉi-am daŭ-re gar-nu ĝin por or-nam' kaj fir-ma pro -  
 Do vi a - ni-moj en trank-vil' res-tu pa - ce en Pa-ra -

*D.C.*  
 (Al antaŭludo)  
 tekt'.



diz'. Res-tu pa - ce en Pa - ra - diz'.